EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

# * Diskuta dokumento

Por la kunsido de la Eŭropa Komisiono, julio 21

kaj AMO 74 en julio 24, ambau en la Virtuala Kongreso

EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

# De kursoj al komunumo

Por la kunsido de la Eŭropa Komisiono, julio 21

kaj AMO 74 en julio 24, ambaŭ en la Virtuala Kongreso

EK!

**Eŭropa Komisiono**

de Universala Esperanto-Asocio

- Problemo: La tre alta averaĝa aĝo de Eŭropaj esp-istoj.
- Proponata projekta diskuto: El kurso al komunumo
- Arigi listojn de kursoj konvenaj por eŭropanoj
- Krei meĥanismon por rekoni la atingojn de kursfinintoj, kiuj plektos ilin en la komunumon, unue loke kaj poste al UEA aŭ ILEI aŭ IKEF aŭ aliaj Esperantaj Asocioj.

# Problemo kaj survoje al solvo

EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

* La modelo: La mirinde efika hispanlingva kurso, kiu altiris en 2020 almenaŭ cent junajn membrojn al UEA. Multaj el ili restas en 2021, sekvante kompletigan kurson.
* La Eŭropa Komisiono nun arigas informojn pri lingvokorsoj tra Eŭropo. Ĝi jam ricevis rezultojn el seso da landoj.
* Kiam preta EKO komunikos la rezulton.

# La pretigaj laboroj jam okazas

EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

* UEA devos proponi eblojn por kurso-prizorgantoj proponi sukcesintojn
* La celo estas premii eminentajn kursfinintojn por unujara prova membreco en UEA.
* La proponado devos okazi rete laŭ simpla reta formularo.
* Tiu formularo devos plene konformi al la bezonoj de la administrado en la CO, por ke la membrigo estu maksimume automata.

# *UEA rekonu kursfinintojn

EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

* UEA devos post la apero de la listo de kursoj starigi kriteriojn por rekoni kursojn, cele al premiado.
* UEA devos starigi normojn pri la amplekso kaj niveloj de la akceptotaj kursoj.
* ILEI klare povos ludi rolon en tiu prijuĝado.
* UEA devas postuli, ke la kursoj enhavu gradon de movadaj informoj, i.a. pri UEA kaj TEJO.

# *Allaseblo de kursoj por premioj

EK !

Eŭropa Komisiono

de Universala Esperanto-Asocio

* La aktiva kunlaboro kun TEJO esencos pri kreskigo de la pli juna membraro.
* TEJO havas rolon logi homojn al la amaso da kursaj ebloj.
* TEJO povos logi kursfinintojn al junularaj eventoj: IJF, JES, IJK kma, post restarigo de surlokaj realigoj.

# Ne eblas diskuti rejunigon sen TEJO

Eŭropa Komisiono
de Universala Esperanto-Asocio

* Bezonata estos buĝeto por la projekto, se akceptota.
* La monfontoj alireblaj determinos la skalon de la projekto de jaro al jaro.
* La sukceso ege dependos je la preteco de la kursaj organizantoj kunlabori kun UEA, TEJO kaj ILEI.

# Rimedoj esencas

# Reagoj el AMO 74

- Partoprenintoj de la hieraŭa AMO 74 timis, ke plena membreco de UEA aŭ aliĝo al UK tro fruas por kursfinintoj.
- Ni trovu pli konvenajn enirpunktojn.
- Ni eksciis, ke UEA kunlaboras kun la organizantoj de SES, kiu estas ege pli alloga evento ol UK, kiu povos timigi novulojn.
- La revuo de UEA ne konvenas por novuloj – prefere *Juna Amiko* aŭ <UEA: facila.org>
- UEA pli konvinke prezentu sian oferton de servoj.

EK !

**Eŭropa Komisiono**

de Universala Esperanto-Asocio

# * Demandoj kaj konstato

Ĉu la Eŭropa Komisiono kredas je la propono?
Ĉu la Komisiono pretas modifi kaj progresigi ĝin
Ĉu UEA kaj ILEI vidos valoron en la ideo?

Eŭropo havas eble centon da kursoj. Kial la komunumo cerpas el tio nur modestan rikolton? Kiel porti la homojn…

# * …de kurso al komunumo?

Por la kunsido de la Eŭropa Komisiono, julio 21
kaj AMO 74 en julio 24, ambau en la Virtuala Kongreso